

Eŭropa Bulteno


novembro 2006, № 10 (52)

De la redakcio...


Karaj gelegantoj,

En la numero kunlaboris multaj geesperantistoj pro kio mi dankas al ĉiuj. Estonte mi esperas ke vi, gelegantoj, informos nin pri interesajoj kiujn mi bonvole anoncos. Skribu pri via agado.

Ankoraŭ foje ni atentigas gejunulojn ke alproksimĝas novjaro kaj limdato ĝis kiam ili povas senpage aliĝi al EEU kongreso. Agrablan legadon, **Vesna Obradović**



ESPERANTO EN MONDA FILATELA EKSPOZICIO "BELGICA 2006"- INTER LA 16-a KAJ LA 20-a DE NOVEMBRO



Mi estas filatelisto kaj mia temo estas Esperanto. De 15 jaroj mi havas kolekton, "Que Babel soit détruite!" kiu regule partoprenas naciajn kaj internaciajn filatelajn ekspoziciojn. En ĝi mi prezentas, laŭ la reguloj de filatelo, la lingvan problemon, la historian strukturon kaj la atingojn de nia Esperanto.

Ĉijare ĝi estis denove, por mia ĝojo, akceptita en Monda Ekspozicio. Ĉifoje en Bruselo, de la 16-a ĝis la 20-a de Novembro 2006. Bedaŭrinde nur la kolekto veturos al Belgio, ne mi. Mi ĝojas, ĉar pro la grava ekspozicio ĉiam estas okazo enlande paroli pri Esperanto en filatelaj gazetoj.

En tiaj okazoj de partopreno mi kutimas informi lokan E-rondon, ĉar povas esti interese por veteranoj kaj lernantoj viziti kaj konatiĝi kun kelkaj unikaj dokumentoj de E-historio, kiel pormilitista karto kun reklamo pri Esperanto en la Unua Mondmilito aŭ poŝta stampo de la Deka Universala Kongreso, kies poŝta ĝiceto funkciis dum nur kelkaj horoj ĝis la entuta nuligo de la UK pro la militeksplodo en 1914. Mia kolekto estas verkita en la franca, unu el la akcepteblaj lingvoj de la Internacia Filatelo-Federacio (FIP).

"Belgica 2006" okazos en la Internacia Konferencejo kaj Ekspoziciejo Brussels Expo (Heyzel). Pliaj informoj: <http://www.belgica2006.be> en kiu vi certe vidos la liston de la ekspoziciotaj kolektoj mem. Certe ne nur pro Esperanto indas viziti la ekspozicion.

James Rezende Piton

VESPERMANĜO-DEBATO UNU PAŜO ANTAŬEN

En la 3-a de oktobro okazis hotele en Bruselo, urbo kie ĉefsidas EU, “vespermanĝo-debato pri komuna lingvo” al kiu kunlabore kun la Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) estis invititaj 107 francparolantaj deputitoj (el Francio, Belgio kaj Luksemburgio).

Tamen, bonvolis partopreni Harvard-profesoro Philippe van Parijs, kiu deflanke konsilas la estron de la EU-komisiono pri multlingveco Figel kiu emas akcepti la nunan angliĝon, prof. d-ro Hugo Baetens Beardsmore de la Libera Universitato de Bruselo kiu forte favoras multlingvismon, kaj francaj, belgaj, irlandaj, slovakaj kaj italaj diplomatoj ĉe EU. Ili venis anstataŭ deputitoj kiuj pensas ke la elekto de la angla kiel komuna lingvo de EU estas neniel haltigebla, aŭ kiuj ne multe interesiĝas pri lingvopolitiko.

Niaflanke ĉeestis EEU-prezidanto d-ro Sean O Riain, diplomato ĉe la irlanda ambasadorejo en Bruselo, EEU-vicprezidentino s-ino Flory Witdoeckt, esperantistino kaj EU-parlamentanino s-ino Margareta Handzlik, la slovakaj diplomato s-ro Jozefo Reinvar kaj mi, sume 5 homoj. La interparolo okazis franclingve kaj s-ino Flory Witdoeckt interpretis.

Ili konstante argumentadis: “La angla estas jam disvastiĝinta tra la mondo, kaj per ĝi oni komercas. Do, estas plej nature uzi ĝin kiel komunan lingvon”.

Prezidanto Sean O Riain daŭrigis sian mild-tonon sed fortan persvadon. Dirante “La Esperanto-Wikipedio jam havas pli ol 59,000 artikolojn, kaj almenaŭ unu nova libro publikiĝas ĉiutage en Esperanto. La Papo ekuzis ĝin publike en 1994, kaj intertempe daŭre uzas ĝin. “Pro la principo: unu litero, unu sono - ne necesas prononcindikoj” kaj “Ĝi estas latinbaza do Eŭropanoj povas ĝin ellerni per dekono da laborpeno kompare kun la angla” li priparolis la avantaĝojn de Esperanto.

Plie li kontraŭargumentis: “En Hungario ĉiujare 7-8 mil personoj studas Esperanton universitate kaj elgradiĝas en ĝi” kaj “Eĉ pagante al Britio jare 17 miliardojn da eŭroj por studi la anglan, lerni eksterlande, inviti instruistojn ktp, EU-loĝantoj tute ne atingas la nivelon de Britoj. Esperanto plene protektas la intergentan egalecon.”

Mi eldiris: “Indonezio uzanta paralele homfaritan komunan lingvon indonezian kaj ĉ. 740 insulajn lingvojn, estas ekzemplo de ŝtato sukcesinta iĝi dulingva. Nun mi estas petinta al ĝia ŝtatrezidento intervjuon, kaj se tio sukcesos mi planas prezenti lin en franca ĵurnalo.” Kaj “Dum la homaro baraktas pri la angla, nur angla-parolantoj povas sin dediĉi al avangarda teknologio kaj novaj inventoj“, “Pli kaj pli profundiĝas la abismo inter riĉo kaj malriĉo, kaj ne ĉesas eksplodoj de teroro.” Mi klarigis: “Protektiĝas lingva egaleco kaj unuafoje malfermiĝas vojo al interparolo cele al vera mondpaco”.

EU-parlamentano Margareta Handzlik diris “Multaj polaj EU-parlamentanoj scipovas la anglan, sed ne-kapabluloj ne povas partopreni en la diskutoj kaj restas komplete eksterafere”.

Ili ne sciis kiel respondi kaj prez. Sean O Riain ŝanĝis la fluon provokante “Kvankam laŭ la EU-konstitucio la popoloj kaj lingvoj de ĉiuj membro-ŝtatoj estas egalaj, pro la uzo de la angla kiel komuna lingvo, kio okazas al la konstitucia spirito, al demokratio kaj justeco?” La diskuto ekis je la 8:00h vespere kaj finiĝis nur je la 00:40h nokte; pro mia dunokta-kvartaga salt-vojaĝo kaj la pli ol 5-hora debato mi estis plene elĉerpita.

Sed, eble pro nia homara vidpunkto, pro la entuziasmo de ni alvenintaj el Japanio kaj diversaj eŭropaj landoj aŭ pro mia viv-veta anonckampanjo ks, ili sentis simpatian kaj ilia rezistemo videble moliĝis.

Fine ankaŭ ili agnoskis, ke “En la mondo ekzistas seriozega lingva diskriminacio, kaj indas vekti la politikistojn kaj civitanojn ĉar tiu problemo meritas pridiskuton.” Plie, mi ricevis retpoŝtajhon de prez. Sean O Riain ke li invitintis la plej rezistemajn prof. van Parijs /la Universitato-Harvard/

kun lia edzino vespermanĝi en la 8a de oktobro ĉe si kaj tiukaze la profesoro diris “La vespermanĝo-debato estis ege signifoplena”.

Unue mi pensis, ke pro la ne-partopreno de parlamentanoj malsukcesis la ĉifoja debato, sed konsiderante ke ni ŝanĝis la vidpunkton kaj pensmanieron de influhavaj eguloj de la partio antaŭenpelanta la anglan, mi pensas ke ĝi lasis gravajn spurojn.

Etsuo Miyoshi

EEU PERSPEKTIVOJ POR LA JARO 2007 (propono por orientiga laborplano)

1. EEU-KONGRESO EN Maribor – kontaktoj kun slovenaj politikistoj kaj strategio por EU: slovena registaro proponu iun aferon utilan por Esperanto dum sia prezidanteco de EU (unua duono de 2008).
2. Aktiva funkciado de retpaĝo de EEU
3. Kreo kaj distribuo de DVD-filmo »Kia povus esti Eŭropo« al EU-parlamentanoj kaj de libro »Zamenhofstrato« en pluraj naciaj lingvoj
4. Invito al EU-parlamentanoj kaj kelkaj membroj de EU-komisiono (Potočnik, Figel, Orban) al la Maribora kongreso, ke ili partoprenu en la ĉeftemo de la kongreso: »Akvoj« kaj konferenca temo »Interkultura dialogo kaj komunikado«
5. Eŭropa himno kantata en Esperanto dum la EEU-kongreso
6. Starigi financajn petojn por la financado de EEU al EU-fondaĵoj kaj fondi Junularan EEU.
7. Du-3 pliaj leteroj al EU-parlamentanoj dum la jaro
8. Solena prifesto de liungvaj tagoj pere de komuna kampanjo en laŭeble multaj landaj asocioj (fine de februaro Tago de gepatraj lingvoj kaj la 26an de septembro Tago de eŭropaj lingvoj).
9. Gvidado de kampanjo en ĉiuj landoj de EU por instraudo de Esperanto en lernejoj kaj samtempe klopodado ĉe la Eŭropa Parlamento pri vastigo de la hungara leĝo, kiu permesas instruadon de Esperanto en la lernejoj.
10. Fortigo de la esperantista movado en Estonujo, Grekujo kaj Irlando kaj ekpropagando pri Esperanto en Kipro.

Raportis: Zlatko Tišljarić

BONA NOVAĴO

Ek de la januaro 2007 ni havos por nia ĉefa celo “multlingveco” rektan adreson en la Eŭropa Komisiono!

La nova Komisionano por Rumanio respondecos pri EU aktiveco rilate al multlingveco kaj subteno de Eŭropaj lingvoj.

Do, mi proponas strategian diskuton pri komuna dokumento pri “Lingva diverseco en Eŭropo helpe de Esperanto”. Aktuale mi preparas por la Bratislava internacia konferenco dokumenton pri “Lingva diverseco renkonte al efika komunikado en Eŭropo”.

Michael Cwik

UMEA INVITAS JUBILEAJN SUBTENANTOJN


En jaro 2008 UMEA festos sian 100-jaran fondiĝdatrevenon. En tiu okazo UMEA invitas kaj petas, ke vi estu Jubilea Subtenanto de UMEA.

La kotizo estas 100 Euroj. La subtenantoj ricevos la ĵus aperintan pli ol 500-paĝan Esperantan-Anglan Medicinan Terminaron, abonon por nia organo Medicina Internacia Revuo (2007-2008) kaj en la jaro 2008 memorinsignon kaj memordiplomon. La Subtenantoj favorpreze rajtos partopreni nian jubilean festan konferencon en Krakovo (Pollando).

Pri la aliĝoj, pagmanieroj, ktp. bonvolu demandi kaj skribi al D-ro Imre Ferenczy, prezidanto de UMEA. HU-9002 Gyö r, Pf. 143. Hungario, rete: iferdr@t-online.hu

D-ro Imre Ferenczy

ESPERANTO DUM LA KONGRESO DE EŬROPA VERDA PARTIO EN ĜENEVO



Ĝenevo

Danke al pluraj helpantoj AVE povis montri denove Esperanton dum la Kongreso de Eŭropa Verda Partio en Ĝenevo.

Entute partoprenis Charmian, Marie, Jacqueline, Nicole, Mireille kaj Charles kun alia samideano. Do, ni povis informi kaj diskuti en pluraj lingvoj.

Charmian kunportis koncizajn informilojn pri Esperanto kaj pri la gramatiko en la angla kaj franca, de SAT ni havis materialon en aliaj lingvoj (finna, sveda). Pri la uzado de Esperanto ene de la Verda Movado ni havis "Verdan Mondon" en la angla, franca kaj germana; la AVE-informileto "Kial ..." estis krom tio en la germana,

nederlanda, norvega, pola kaj serba. La bela afiŝo "Paco estas ..." en Esperanto kaj 118 lingvoj beligis nian standon, la samideanoj ricevis ĝin kiel eta rekompenco, kaj pluraj aliaj aĉetis ĝin - kaj multaj serĉis sian lingvon (ankaŭ estis ekstereŭropaj gastoj el Ĉilio, Japanio, k.a.).

Ĉi-foje ni ne prezentis rezolucion, ĉar kutime nenio sekvas el tia rezolucio. Ni disdonis ekzemplerojn de "kontribuo pri la lingva demokratio ene de Eŭropa Verda Partio" en la franca verkita de kelkaj francaj verduloj, la angla kaj en Esperanto (mi ja sendis ĝin al la AVE-retanoj - en la angla - kaj intertempe ĝi troviĝas sur nia retejo). Ĝi postulas uzi ne tro komplikajn lingvojn kaj disciplinon de la denaskaj parolantoj de la angla, paroli nek tro rapide, nek tro slange. Ili eĉ metis la punkton, serioze konsideri la uzadon de artefarita lingvo. Laŭdire kelkaj plendis pri tio kaj tial oni oficiale ne disdonis la "kontribuon".

Fakte, dum la kunsido de "Tutmondaj Verduloj" oni plurfoje parolis pri la lingvaj problemoj; kaj ĉar AVE jam de 1984 havas regulajn kontakton kun Eŭropa Verda Partio, Catherine Grèze aludetis al la vizia solvo pere de Esperanto, sed ne pli.

Malgraŭ tio ni havis multajn bonajn interparolojn, kaj montriĝis unu novbakita esperantisto inter la delegitoj kaj alia lasis sian filon ĉe ni por lerni la bazan gramatikon.

Manfred Westermayer

INTERLINGVISTIKA SESIO EN POZNAN KUN PUBLIKAJ PRELEGOJ POR NEESPERANTISTOJ

20 gestudentoj el 10 landoj partoprenis la trian semestron de la Interlingvistikaj Studoj de UAM inter la 23-29-a de septembro. Prof. J. Wells gvidis kurson pri la bazoj de ĝenerala kaj esperanta fonetiko. Doc. Michel Duc Goninaz prezentis problemojn de esperanta sintakso. István Ertl traktis ĉapitrojn el la tria periodo de esperanta literaturo kaj analizis poemojn de W. Auld. Michael Farris (instruisto en UAM) faris enkondukon al ĝeneralaj leksikologio kaj semantiko.



Malgorzata Nitkowska, pola studentino el la antaŭa grupo sukcese defendis sian diplomlaboraĵon “Propedeŭtika valoro de Esperanto por la lernado de la angla lingvo” sub la gvido de Maria Majerczak.


La sciancan programon akompanis agrabla varmaŭtuna renkontiĝo kun poznanaj esperantistoj en la ĝardeno de unu el la partoprenantoj.

Kiel tradicie aŭtune, la universitatan sesion kompletigis riĉa arta programo de la 22a Arkones kun signifa kontribuo de la prelegantoj kaj ankaŭ de parto de gestudentoj (pri Schwartz, francaj kanzonoj, problemoj de tradukado, diskuto pri W. Auld, DVD “Esperanto elektronike”, rusoj, e-a slango, lingvaj rajtoj...).

La publikaj prelegoj pri lingvopolitiko en EU en la universitato post la sesio por neesperantistoj estis nova iniciato. Krom la prelegantoj de IS kontribuis ankaŭ Malgorzata Handzlik, eŭroparlamenta deputitino.

Ilona Koutny

PUBLIKAJ PRELEGOJ PRI LINGVOPOLITIKO EN EU EN LA UNIVERSITATO ADAM MICKIEWICZ



Ranieri Clerici

La 30an de septembro posttagmeze, tuj post la interlingvistika sesio okazis publikaj prelegoj en UAM pri lingvopolitiko organizita far la Interlingvistikaj Studoj. La nova iniciato celis montri al la universitata kaj urba publikoj la lingvan situacion kaj problemojn en EU kaj la kontribuon de Esperanto al la solvo de la problemo, krome prezenti interesajn lingvistikajn faktojn helpe de E-o.

La aranĝon malfermis hab. prof. M. Kreglewski, vicrektoro de UAM, poste sekvis trarigarda prelego de Malgorzata Handzlik eŭroparlamenta deputitino pri lingva situacio en la pola lingvo. I. Ertl disponigis datumojn pri la tradukado en EU en Esperanto kun pola interpreto. Dr. D. Blanke traktis eblajn solvojn por la EU-komunikado

ne prisilentante la problemojn.

En la dua parto okazis surpodia diskuto pri internacia kaj interkultura komunikado gvidata de dr Z. Galor, kie ĉiuj emfazis la multlingvecon kaj multkulturecon de Eŭropo kaj la eblan kontribuon de planlingvo. Krom la kostoj gravas ankaŭ la kvalito de komunikado.

La tria parto entenis du prelegojn: unue prof. J. Wells gvidis la partoprenantaron tra la mirinda mondo de sonoj, poste doc. M. Duc Goninaz tra la mirinda mondo de vortoj. La aranĝon resumis kaj fermis doktorino Ilona Koutny, gvidantino de la Interlingvistikaj Studoj.

Ilona Koutny

GRANDA EKSPOZICIO "LA JARA LERNEJA FORUMO"

Okazis inter la 30-a de oktobro kaj 1-a de novembro.

Vidu: <http://skolforum.stofair.se/10154/index.asp>

Post la unua tago de "Skolforum" ni ĉiuj tri (Siv Sjögren, Lars Forsman kaj mi) opinias ke la sento estas "sukceso". Ni havis viziton de instuistoj-esperantistoj de foraj urboj de nia lando. Ankaŭ ili konsentis. Ni havis viziton de viro kiu rakontis ke antaŭ multaj jaroj estis granda laborista intereso pri Esperanto en Kiruna kaj post la morto de iu entuziasmulo postrestas heredaĵo por instruado kaj ni establis kontakton kun Lars Forsman antaŭa instruisto de la Popola Altlerneja Esperantokurso en Karlskoga.



En nia tre eta budo 3x3 metroj ni aranĝis "lernejon kun 6 seĝoj" kaj ĉiun horon Lars Forsman donis etan lecionon. Ĉiuj 6 seĝoj estis plenplenaj.

Dumtempe Siv Sjögren kaj mi disdonis informmaterialojn al preterpasantoj. Hodiaŭ ni sentis ke ne estis multaj demandoj kiel "ĉu esperanto ne estas mortinta?" - tial ni ne devis defendi la lingvon. Ni tutsimple informis ekzemple ke ĝuste nun 15 svedaj bibliotekoj mendis la lernolibrojn por gimnazioj.

Ni montris bildludon pri Esperanto kiun la sveda ILEI preparis kaj ni disdonis al lernejestroj kaj lingvoinstruistoj kiuj montris intereson, la DVD kiun [E@I](#) preparis. Kaj ni sentis ke nia budo ĉiam estos bone vizitata.

Mi aparte dankas ĉiujn kiuj per mondonacoj kaj labortempo faris tion ebla!

Kaisa Hansen

ĈU BONA MANIERO ARGUMENTI POR ESPERANTO EN EŬROPO?

Pro mia profesio mi partoprenis en seminario pri eŭropaj valoroj en Sudgermanio kiel reprezentanto de mia maribora edukcentro. Partoprenis reprezentantoj de kvin partneraj edukorganizaĵoj por plenkreskuloj el Germanio, Aŭstrio, Slovenio kaj Italio. Mi prezentis tie mian komprenon de eŭropaj valoroj: ke la ĉefaj valoroj pri kiuj eŭropanoj devus esti fieraj kaj kiuj diferenciĝas de aliaj mondopartoj estas: sociala ŝtato (solidareco kaj senpageco de servoj por infanoj, maljunuloj, invalidoj, senpaga minimume 8-jara lernejo, komuna sanasekuro, prizorgo de pensiula sistemo, helpo al senlaboruloj...), subsidara sistemo (malcentrismo rilate la grupan suverenecon), malaprobo de diskriminacioj ĉiuspecaj (rasaj, religiaj, naciaj, seksaj, handikapulaj...) kaj taksado de diversecoj kiel pozitivaĵo (diversaj rasoj, religioj, politikaj orientiĝoj, nacioj, kulturoj estas valoroj).

Aldone mi klarigis, ke por komuna identeco gravas kompreni ideojn pro kiuj ni devas esti fieraj pri Eŭropo kiuj baziĝas je kompreno de apartaj eŭropaj valoroj, sed ke gravas ankaŭ simboloj

kiuj memorigas homon pri lia eŭropaneco. La ĉefa grupsimbolo estas lingvo, kiun Eŭropo ne havas. La simbola lingvo de nova grupaparteno devas esti alia ol estas la ekzistantaj lingvoj, sekve devas esti neŭtrala rilate al la ekzistantaj naciaj kaj regionaj lingvoj. Mi klarigis ke estas pluraj ebloj por elekti tian neŭtralan lingvon, sed ke laŭ mi du estas la ĉefaj kandidatoj: la latina kaj Esperanto. Pri Esperanto pluraj el la partoprenantoj aŭdis, sed ne precize sciis ion pli konkretan. Kelkaj havis klasikan antaŭjuĝan starpunkton: artefarita lingvo neniel povas anstataŭi naturajn lingvojn kaj neniel povas esti samvalora kun ili.

Nek estis tempo nek eblo polemiki pri tio. Tial mi skribis sur la tabulo kelkajn adresojn de ttt-paĝaroj pri Esperanto kaj diris: »Mi petas de vi nur unu aferon: kiel eŭropanoj akceptu la aliecon kiel valoron. Mi estas por vi aliulo, mi apartenas al alia grupo kiu kredas ke Esperanto estas bona solvo. La nura afero kiun mi petas estas: informiĝu pri Esperanto antaŭ ol diskuti pri ĝi. Ne kondamnu aliulon antaŭ ol scii kiajn pozitivajn li kunportas.« Kaj mi montris la ttt-paĝaron, kie ili povas informiĝi.

Aprile ni havos plian renkontiĝon. Mi testos por vidi, kiuj informiĝis kaj kian opinion ili havos tiam.

Zlatko Tišljar

PROJEKTO AKEL - por pliprofundigi eŭropcivitanecan

Ekde kelkaj jaroj, enkadre de Eŭropa Esperanto-Unio, funkcias projekto AKEL-Alternativa Komunikado inter Eŭropaj Lernejoj, kiu ĉefe celas pliprofundigi eŭropcivitanecan per Esperanto. Akel-partoprenantoj lernas Esperanton kaj dum du aŭ tri jaroj sin intervizitas per internaciaj aranĝoj ĉe ĉiu nacia grupo. Tiaj vizitoj ankaŭ iom ŝancigas eklerni naciajn lingvojn de la gastantoj. Krom tio la partoprenantoj serĉas informojn pri siaj lernejoj, urboj kaj landoj por ilin disvastigi Esperante al partneroj. Tiel Eŭropo kaj Esperanto plifortiĝas, ni opinias.

Por atingi tiajn celojn ĉiu grupo kandidatiĝas al eŭrop-programo Socrates/Comenius-1 januare por ricevi monsubtenon. Tio ebligas la veturadon kaj restadon eksterlande kaj pro tio ĝi vere gravas. Oni bezonas almenaŭ tri lernejojn el tri malsamaj landoj por sukcesi krei grupon Comenius. Ĉiuj landoj de Eŭropa Unio kaj de asociitaj landoj, t.e., Bulgario, Islando, Liĥtenŝtejno, Norvegio, Rumanio kaj Turkio, povas partopreni.

Do, kiu ŝatus aventuriĝi kune kun la du estantaj grupoj?

Nuntempe du AKEL-grupoj agis, kunligante lernejojn de Bulgario, Italio, Britio, Hispanio kaj Francio (Akel-2) unuflanke, kaj aliflanke lernejojn de Pollando, Rumanio, Francio, Hispanio, Litovio kaj Portugalio (Akel-1).

Ĉe www.lingvo.org, klaku sur AKEL kaj vi trovos pliajn informojn en taŭga retejo, ĝisdatigota baldaŭ, mi esperas. Vi povas rekte kontakti min per la retadreso ludoviko@portugalmail.pt

Legu pli pri la projekto AKEL en Libera Folio:

<http://www.liberafolio.org/2005/Agado/eeuidenteco/?searchterm=akel>

kaj la raportojn pri AKEL-renkontiĝoj en Bulgario kaj Italio:

<http://www.edukado.net/anoncoj/15182>

<http://it.groups.yahoo.com/group/esperantisti-italiani/message/9820?viscount=100>

Luis Ladeira

1655 VIZITANTOJ EN LA ESPERANTO-MUZEO EN VIENO

La 7-an de oktobro 2006, je la ago-tago 2006, okazis en tuta Aŭstrio la „Longa Nokto de la Muzeoj“ al kiu partoprenis ankaŭ la Esperanto-muzeo en Vieno. Pasintjare 1 025 personoj vizitis la Esperanto-muzeon kaj ĉi-jare 1655, tio estas 630 pli. Tiu ĉi rezulto montras ke interesiĝo por Esperanto kreskis.



Esperanto-muzeo en Vieno

Leopold Patek

Pri nia kongreso...

KONGRESAJ NOVAĴOJ

Doktoro Janez Potočnik – komisionano de EŬ-komisiono skribis al la kongreso:



Bruselo, la 29-an de septembro 2006 al Zlatko Tišljar, sekretario de EEU

Estimataj,

Mi dankas por la invito partopreni en la malfermo de la 7^a kongreso de EEU okazonta inter la 28^a de julio kaj 4^a de aŭgusto 2007 en Maribor. Bedaŭrinde mi devas informi vin ke pro antaŭe planitaj oficaj devoj mi ne povos ĉeesti.

Mi deziras al vi sukcesan agadon kaj kore vin salutas.

Janez Potočnik

Raportis: Zlatko Tišljar

Ĝis nun al la kongreso aliĝis esperantistoj el 14 landoj: Pollando, Francio, Rusio, Hispanio, Italio, Portugalio, Ukarainio, Hungario, Svedio, Danio, Belgio, Ĉeĥio, Aŭstrio kaj Slovenio. Ni atendas vian aliĝilon.

Vesna Obradović

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 4-an de novembro 2006.

Redaktoro: Vesna Obradović.

En la numero kunlaboris: Etsuo Miyoshi, James Rezende Piton, Kaisa Hansen, Zlatko Tišljar, Imre Ferenczy, Michael Cwik, Luis Ladeira, Manfred Westermayer, Ilona Koutny, Leopold Patek kaj Vesna Obradović; fotoj de Peter Balaž, Christian Eppler kaj Kaisa Hansen.

Leterojn kaj komentojn sendu al la sekretario de EEU: zlatko.tisljar@azm-lu.si

Kontaktoj: komunikadcentro@esperanto.org kaj vesna.obradovic@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.lingvo.org>